

KOSMOPOLITA
OKTOBRO 2004
kial la viroj foriras la sekvantan matenon
Kaj Kio Devigas Ilin Resti?
Nepre Legu!
50 Metodoj por Simpligi Vian Frenezan Vivon
Facilaj Orgasmoj:
Kiel Fari Ilin Halucinaj... Kaj Malpli Pene
Sagacaj Respondoj Al Liaj malfacilaj Demandoj Dum la Unua Rendevuo
Kiel Ĉesi Tromanĝi
5 Lertaĵoj Provindaj
150 Plej Sensualaj Printempaj Aspektoj
Speciala Sekcio pri la Belo kaj Modo de Cosmo
Ĉu Vi Antaŭe Vivis?
Kiel Eltrovi Niajn Vivojn Pasintajn


MOMENTON!
MACEIÓ 2004
KONGRESEJO aŭ PARADIZO?
PRINTEMPO2004
brazilaesperantistajunularaorganizo
BEJO



ĈIPAĜE | MACEIÓ





# MOMENTON!

#05 PRINTEMPO 2004

Saluton, kamaradoj!

La Brazila Kongreso de Esperanto estas la plej grava evento Esperantista en nia lando. Unu fojon jare, pilgrimas la esperantistaro al la kongres-urbo, kiu ĉi-foje fariĝis Macejoo, la ĉefurbo de la ŝtato Alagoaso.

Ne nur el primovadaj temoj konsistas la aktivaĵoj de la kongreso. Junuloj tie ankaŭ profitas por renkonti la amikaron, koni aliajn esperantistojn, amuziĝi uzante la karan lingvon kaj ankaŭ por aktivi en la movado.

Pro tiu graveco, la taglibro de la kongreso estas la ĉeftemo de nia bulteno "MOMENTON".

La celo de la taglibro ĉiam estos amuze raporti la okazintaĵojn (iom troige kelkfoje) eĉ se por tio, iuj devas esti "krucumitaj". Sed tio ne estas facila, ĉar necesas esti iomete kuraĝa (aŭ stulta - elektu laŭvole). Kaj plurfoje la krucumito estas la verkinto mem. :-)



Mi dankas al Rafael Lins (Salvador/BA) pro la instigo refoje verki taglibron de la kongreso, kaj pro la akcepto de la tasko respondi pri la eblaj malbonaj rezultoj el ĝi. Tial, se vi volas plendi, sakri, kondamni aŭ mortminaci b.v. skribu al li:  rafaellins@hotmail.com

Dezirante plezurigan legadon, ĝisbaldaŭas mi!

> Rogener Pavinski, Oktobro/2004

**REDAKTADO** | Rogener Pavinski, Ribeirão Preto.
**ARTO kaj PRILABORADO** | Roger Borges, Barcelona.
**SUPERRIGARDO** | Ísis Okabe Piton, Campinas.
**REVIZIADO** | James R. Piton, Campinas.
**DISTRIBUADO** | BEJO, fondita en 1967 (Landa Sekcio de TEJO ekde 1968).
Caixa Postal 1097   13001-970   Campinas, SP  BRAZILO

MOMENTON > Kvarmonata revuo de BEJO. **momenton@esperanto.zzn.com**

# BEJK MACEIÓ >>>
## NIA GRANDA, ETA KONGRESO

Brazila kongreso en nordoriento. Jen bona ŝanco por ke homoj, kiuj loĝas en tiu parto de la lando kuniĝu kun aliaj kiuj povas veni al nordo pro Esperanto. En la unua fojo mi iris al nordoriento – kia bona sperto! Belajn memorojn mi portis el Macejoo, ĝiaj plaĝoj, ĝia popolo ktp.

Ĉi tiu 39a kongreso sendube estis ege grava por la movado brazila. Unuafoje du grupoj konkuris por la estraro de BEL, kaj la balotado por la elekto estis varme disputata.

Mi partoprenis la kongreson kiel "kunordiganto de eventoj" por BEJO. Tiel mi plejparte zorgis la junularan programon, kaj ne multe povis partopreni la kongresajn aktivaĵojn. Sed eĉ tiel mi provas raporti pri tiu agrabla sperto al vi.

**Sabato, la 17an de Julio**
**– La vojaĝo "komencas" ĉi tie**

"Sabate matene mi vekiĝis kaj finpretigis la valizojn, kiujn mi ekpretigis antaŭ ol dormi, frumatene. Post 4-hora vojaĝo ni atingis la stacidomon en San-Paŭlo. De tie ni iris al alia stacidomo, kie mi trovis la geamikojn el Kuritibo-PR kaj aliajn homojn atendantajn la buson, kiu gvide de Mariselle (el San Paŭlo) veturigos nin al la flughaveno.

Tie troviĝis la elito de la ŝtata e-movado, kaj senteblis en la aero la apartigeca etoso pro la bataloj en la ret-diskutlistoj. La du grupoj, kiuj konkuris por la estraro de BEL eĉ ne rigardis unu la alian. Ĉiamaniere, mi portis la video-kameraon ĉe-mane preta por kapti eventualan batalon, kiun mi atendis kaj feliĉe ne ozakis. Vere, en Interreto ĉiuj sentas sin povaj diri kion ajn, sed vide-al-vide la afero fariĝas alia, kaj la esperantistoj donis belan ekzemplon pri bonkonduto (aŭ pri sindeteno).

En aviadilo apenaŭ eblis komforte sidi - la spaco inter seĝoj estas ege malgranda. La aviadilo iom svingiĝis dum la elteriĝo kaj alteriĝo sed bonŝance por la e-movado ĝi ne falis. Menciindas ankaŭ la manĝ-horo, kies unika plado estas "Mac' Lanche (In)Feliz" – ĝi venas en skatoleto kaj plenumas sian rolon kiam oni malfermas ĝin. Malĝojo certa!

Atinginte la kongresurbon, ni direktiĝis al la hotelo, kie ni alvenis jam malfrue."

**Dimanĉo, la 18an de Julio**
**– Marborda galopo**

"Dimanĉe komenciĝos la kongreso, tamen nur vespere estos la solena malfermo. Pro tio, dum la tago la plejmulto de miaj samhotelanoj ekskursis al kelkaj sudaj plaĝoj. Mi kaj Rodrigo de Méo (San Paŭlo) ne partoprenis la ekskurson – mi devos renkonti Isis (Campinas/SP) por finpretigi la programon de BEJO-kongreso kaj Rodrigo devos zorgi pri la aferoj de ILEI-BR. Tial dummatene ni decidis promeni en la plaĝoj de Maceió mem. Ni promenis per floso, kaj vizitis naturajn naĝbasenojn kie la fiŝoj venas manĝi en via mano.

**SUPRE |** TAGLIBRO DE LA 39a BKE KAJ 24a BEJK EN MACEIÓ, 18 – 24 DE JULIO 2004
**DEKSTRE |** ISIS, JEAN KAJ AMARILIO DUM BEJK






Rodrigo revenis al la hotelo, por ekzerci prezentadon, kiun li kunprezentos en la malfermo. Mi profitis la tempon liberan por gustumi tapiokon. Danke al Dio, eblis mendi 'vegetaranan' tapiokon (el kokoso, banano, gujavaĵo kaj kaŝtano), kaj tio estis mia savilo dum mia tuta restado en Maceió. Reveninte iom malfrue al la hotelo, mi baniĝis, prenis kelkajn informojn kaj per ordinara buso mi ekiris serĉi la kongresejon. Se dum kongreso tre facilas hazarde renkonti esperantistojn ĉie, imagu kiom facile estas trovi krokodilojn! Mi renkontis du sinjorinojn el Salvador (BA) en la buso, kiuj ankaŭ iras al kongresejo. Unu el ili rakontadis al mi ke pasintjare, dum UK en Svedio, ŝi ekkonis kanadanon kaj ili geedziĝis. "Kiun alternativ-lingvon ili uzadis?" pensis mi. Aŭ ŝi bone regas la anglan aŭ li bone parolas la portugalan.

La kongresejo estis malplena, nur malmultaj tie troviĝis, ĉar la loko de la solena malfermo estos en alia hotelo. Mi restis tie kun Amarílio (Barra do Garças/MT) kaj Ademar (Rio de Janeiro) ĝis kiam ĉiuj foriris kaj fermis la kongresejon por iri al solena malfermo. Survoje, ni renkontis la fratinojn Rozinjo kaj Dinorah (Rio), kiuj estis devigataj akompani nin ĉar en la kongresejo plu troviĝis neniu.

Estis ankoraŭ frue kaj ni decidis sidi en ĉemara lunĉejo. Tie knabo ne malkaŝis la emocion pro persona konatiĝo kun Paĉjo Kristnasko (Amarílio). Rozinjo petis 'naturan' refreŝigaĵon de la kelnero, kiu portis ĝin en 'natura' temperaturo, sed en "Riana" lingvo 'natura' signifas ne 'diet'."



"En la salono la esperantistoj amasiĝis por la malfermo. Ĉe la tablo, la bebo Jean (filo de Isis kaj James Piton) estis la plej juna sidiĝi ĉe tiu grava tablo, kaj eble li enviigis la delongajn esperantistojn kiuj preskaŭ faligis la flagon malantaŭ la tablo. Kiam Amarílo alvokis la karavanojn el la ŝtatoj, ĉiuj ekstaris kaj kriis, sed kiam alvenis la fojo de Alagoas, mi nur aplaŭdojn aŭdis kaj neniun vidis. Tio montras kiom granda estis la laboro de Aristophio kaj sia skipo, por kunorganizi la kongreson en ŝtato kie Esperanton ankoraŭ ne ĝuas grandan publikon.

Oni alvokis la eksterlandanojn por ion paroli ĉe la mikrofono. Manuel el Portugalio, insiste diris ke nenion havas por paroli, sed li tion diris kvarfoje. Li parolis pli ol tiuj kiuj ja havis ion dirindan. Debutis en E-kongreso la artistino Sônia Sánchez (San Paŭlo). Vestita per indianaj vestaĵoj ŝi surprizis ĉiujn pro tia neordinara prezentado. La kostumo estus perfekta sen la okulvitroj. Akompanis ŝin simio (Rodrigo de Meo!) kaj elefanto (Zlóv, el San Paulo), kiuj strange dancis tenante e-flagojn. Ŝi ludis muzikaĵojn proprajn kaj kovraĵojn brazilajn bendakompane.

La programo de la kongreso estis disdonata nur dum la malfermo, kaj nur por Lundo. Tio estis unu el la unikaĵoj de ĉi tiu surpriz-kongreso, oni neniam scias kion atendi. Malfermita la kongreso, mi iris kun junuloj el Minaso serĉi ion por manĝi. Iuj eniris picejon sed mi preferis tapiokejon.

**Lundo, la 19an de Julio –"La Vojo"**
Lunde vere komenciĝis nia surpriz-kongreso. Matene ĉiuj atendis la aŭtobuson kiu devus kunporti ĉiujn je la 8-a matene al la kongresejo, kiu neniu sciis kie troviĝis. Mi irus per la ordinara buso, kiam oni interpelaciis min demandante ĉu mi scias kiel atingi la kongresejon. Tiel mi gajnis vojaĝon per taksio. Poste mi sciis ke la atendata aŭtobuso entute ne aperis.

La programeroj de BEJO nur komenciĝos posttagmeze. Mi iris al la libroservo profiti la matenon liberan. Tie mi vidis la gajan germanon Sebastian aĉetante kilogramojn da libroj. Dum li kalkulis siajn eŭrojn mi vizitis la parton de la libroservoj kie la libroj kostis inter R$ 1,00 kaj R$ 5,00. Iu apud mi demandis "Hej, ĉu vi estas Roĝener?" Mi konstatis ke estis viro granda kaj muskola. Fronte mia skeletoformo mi tuj pensis "Dio volu ke li estu amiko". Tiel mi persone konis Advalk-n, (Recife/PE) kaj tiam li, bonŝance, nenion havis kontraŭ mi.

Kiam Isis alvenis, mi pretis montri la programon de BEJO al ŝi por fina interkonsento, sed se mi estus portinta ĝin kun mi, mi tiam estus multe pli feliĉa. Mi revenis al la hotelo por preni la 'sanktan' disketon, printis kaj disdonis la programojn al gejunuloj. Posttagmeze ni sukcesis arigi grandan nombron da gejunuloj por prezenti BEJO-n, klarigi pri la programeroj ktp.

Nekredeble - neniu dormis!



Tuj poste, Sônia Sánchez gvidis la unuan parton, el tri, de siaj aktivaĵoj. Mirinde bonaj, tiaj ludoj estas tre konvenaj por gejunuloj je ĉiu lingvonivelo. Jen bona nomo por gvidi infanan kongreseton. Eĉ uloj ne tiom junaj amuziĝis tre. Iu sinjoro jam apartenanta al la tria aĝo, Paulo (Natal/RN), ĉeestis en preskaŭ ĉiuj aktivaĵoj de BEJO. Advalk mem iom hezitis, sed ne rezistis kaj saltis kiel baletistino. (Hm, nun li havas ion kontraŭ mi!).

Poste, Felipo Castro (Natal-RN) finis la lundan programon de BEJO parolante pri la rimedoj uzataj de esperantistoj en Interreto.

Mi utiligis la vid-kameraon kaj intervjuis sr. Manuel (Sorocaba/SP), kaj Givanildo (Rio) kaj filmetis iomete tra la kongresejo dum la loko de la arta/surpriza vespero estis diskonigitaj.

Revene al la hotelo per veturigo, mi perdis la oportunon (laŭ la rakontoj) sperti la plej bonan programeron (ne-oficialan) de la kongreso: iri per aŭtobuso (la sama kiu ne aperis matene). La buso forlasis la kongresejon antaŭ mi, kaj kiam mi atingis la hotelon, mi miris, ke la hotelo estis malplena je esperantistoj. Nur poste pli ol hor-duono la buso ekaperis kaj mi eksciis ke la ŝoforo (karese nomita kiel ŝoforaĉo de la pasaĝeroj) elektis tre mallarĝan straton por irigi sian aŭton. Okazas ke la spaco estis nesufiĉa por tio kaj la buso krom resti senira kaj senrevena, ŝtopis la straton. La ŝoforo plurfoje eliris la buson (ĉu eble por peti informojn?) dum la esperantistoj memoris pri la versoj de la poemo 'La Vojo' de Zamenhof ("Obstine ĝi paŝas, provita, hardita, al cel' unu fojon signita!") Kaj tiel estis: la ŝoforo obstinis sed ne sukcesis iri rekten kaj neflankiĝante, ĉar li devis revenigi la aŭton kaj tiel li frakasis plurajn retrospegulojn de la aŭtomobiloj parkitaj.

Sed la surprizoj ne finiĝis tiam. Iom poste aŭdiĝis la voĉo de Rusilo (Sao Paulo): "Mi konas tiun hotelon", "Tre simila al la nia, Hã-Hã-Hã". La ŝoforo estis preterpasanta la hotelon, kaj Rusilo malkovris tiun lastan mokaĵon, tamen oni ne scias kiom da fojoj la buso preterpasis la hotelon antaŭ ol Rusilo ekvidis ĝin.

Post kiam ni malkovris kie troviĝas la loko de la arta vespero per la spuroj lasitaj, jen ni en "Alagoas late Clube'.
La prezentadoj komenciĝis per tipa folklora dancado, en kiu miksiĝis pluraj esperantistoj kun sukceso. Kaj poste venis Vera Ĵordan (Rio), kiu vestita entute blanke kaj nudpieda ŝajnis esti preta por la transiro de la jaro ĉe la plaĝo Kopakabano. Esperantistoj estas ja kreivaj - la ricevilon de la kapmikrofono, anstataŭ kaŝita malantaŭe kiel kutime, ŝi metis sur la (iom rimarkleblan) ventron. Sed tio ne longdaŭris ĉar la mikrofono tiom zumis ke ŝi estis devigata ŝanĝi ĝin al ordinara mikrofono.

Okazis ankaŭ interesa kapoejra ludado.
En tiu tago datrevenis Vandilson Trindade (Salvador/BA) kaj Advalk. Kiel donaco ĉiuj ricevis la programon por mardo kaj merkredo!

La malmultaj el nia hotelo kiuj restis ĝis la fino de la prezentadoj revenis al la hotelo per la aŭtobuso de la Fortalezanoj kaj restis ĉe la enirejo de la hotelo parolante pri kelkaj 'figuroj' de la movado kiuj ne ĉeestis kaj kiuj certe ankoraŭ pli gajigus la momentojn; kaj pri la ankoraŭa freŝa sperto travivita en la aŭtobuso, kiam alvenis Rusilo kaj aldoniĝis al la babilado. Ni tiom multe kaj laŭte ridis ke ni vekis kelkajn en siaj ĉambroj. De sube, mi vidis ombron en unu el la fenestroj rigardante nin kun ne tre amikeca mieno, sed ĉar la ombro diris nenion ni daŭre ridegis. Fine restis mi, kaj Roĝer Gotardi (Curitiba/PR) aŭskultante Rusilon rakonti pri lia sperto pri strangaj lingvoj kaj Esperanto."

oficiala

# BEJO PLUIRAS >>>

## LETERO EL LA NOVA PREZIDANTO

Saluton karaj,

Iuj el vi eble jam konas min iomete pere de artikoloj en nia revuo kaj en “Brazila Esperantisto” aŭ leteroj. Al la aliaj mi tamen volas min prezenti: mi estas Ísis, 27-jara. Mi naskiĝis en la urbo São Paulo kaj nuntempe mi loĝas en Campinas, kun mia edzo James Piton, ankaŭ esperantisto kaj brazila ĉefdelegito de UEA, kaj mia unujara kaj trimonata filo, Jean, al kiu ni denaske parolas en Esperanto.

Nia nova estraro elektiĝis en Maceió. La skipo estas tre respondeca, entuziasma kaj jam de la pasinta jaro laboras kune. Ni jam bone konas BEJO-n kaj nian movadon. Pro diversaj kialoj, ĉiuj taskoj de BEJO estis zorgataj de mi kaj malmultaj aktivuloj. Iuj el ili nun havas oficialan postenon en la estraro.

Ni deziras plibonigi pli kaj pli la servojn de BEJO kaj en tiu ĉi jaro ni pli zorgos pri la movado. Laborante kune kun BEL, BEJO starigos kaj funkciigos la Reton de Reprezentantoj (RR) kaj kreos la funkcion de ambasadoroj de BEJO. Ni havos konkurson “Adido de BEJO” (BEJO-ataŝeo), ni plibonigos “Momenton!”, ni planos novajn aktivaĵojn por komencantoj en kongresoj de BEJO, pli da prelegoj ktp...

Kiel prezidanto mi diras ke la sukceso de BEJO dependas de la laboro de ĉiuj, estraranoj kaj membroj. Mi certas, ke la vojo por revigligi BEJO-n estas kunigi fortojn, BEJO kaj BEL multe povas lerni unu de la alia! Brazilo estas tre konata pro tio, ke plenkreskuloj kaj junuloj bone kunvivas pace. Mi volas ke ni plifortigu tiujn ligilojn. Do, ni laboru kune!

Karaj, ne mankas ideoj, planoj kaj laboro. Ni kalkulas je ĉiuj junuloj por realigi ilin. Se vi deziras esti aktivulo de BEJO, skribu al ni!

Fortan brakumon al ĉiuj,

Ísis C. Okabe Piton
Prezidanto de BEJO

**SUPRE |** LETERO EL LA NOVA PREZIDANTO DE BEJO
**DEKSTRE |** GEJUNULOJ DUM LA BRAZILA JUNULARA KONGRESO DE ESPERANTO 2004





“BRAZILO ESTAS TRE KONATA PRO TIO, KE PLENKRESKULOJ KAJ JUNULOJ BONE KUNVIVAS PACE”

# BEJK MACEIÓ >>>

## TAGLIBRO DE LA KONGRESO

**Mardo, la 20an de Julio**
**– Ĉu al paca cel'**

"Mi vekiĝis iom malfrue pro la pasinta ĝis-frumatena babilado. Kiam mi alvenis al la kongresejo, kelkaj infanoj volis bati min, ĉar la ŝlosilo de la ĉambro kie devos okazi la ludoj de Sonia estis kun mi. Jes, iom malfrue, sed ĝi okazis senprobleme. Dume, la kongresejo iom post tiom pleniĝis je reklamiloj de la grupo de Petro Kavaliro (Sao Paulo), kiu konkuris al la estraro de BEL. Rulbendoj pendigitaj, glumarkoj disdonitaj, manpremoj kaj ridetoj al ĉiuj, nur mankis la infanoj en la brakoj. Lia grupo vere agadis dum Flávio Rebelo (Sao Paulo), alia konkuranto, apenaŭ montris sian vizaĝon en la kongresejo.

En eta promenado al urbocentro, la afero estis iomete suferiga. Partoj de la grupoj disiĝis unuj de la aliaj. Senprobleme; dum kelkaj restis en la gubernia palaco kredante, ke ĝi estas muzeo, iuj decidis tagmanĝi kaj mia grupeto decidis viziti la katedralon. Estus tre saĝa ideo - se ĝi ne estus fermita pro la tagmanĝhoro, kaj se ni ne estus tiel malsataj, kaj se ĝi ne troviĝus tiom fore...

Revene al kongresejo, dum Isis reprezentis BEJO-n en la kunsido de la Federacia Konsilantaro, mi kaj Rodrigo de Meo gvidis BEJO-kunvenon. Ĝi celis diskuti la agadon de BEJO kaj montri al la membroj ĝian funkciadon, kiuj estas ĝiaj bezonoj, planoj ktp. Ni tralegis la statuton kaj komentariis ĉiujn punktojn, instigataj de la intereso de la ĉeestantoj. Dum la kunveno mi foriris iomete ĉar Givanildo Ramos intervjuis min, inter aliaj, por 'Rádio Rio de Janeiro'.

Isis instruis la jam famkonatajn cirklajn dancojn kun sukceso kaj peto por ekstraĵo, kaj iom poste ni surprize ricevis alian spuron por la proksima programero - flugfolion kun nomo de iu drinkejo, kie, laŭ onidiroj, estos la loko de la arta vespero. En la hotelo, pretigante min, mi rimarkis ke serĉe al tiu ejo, la buso ekiris tre frue (eble ĉar oni timis ke la ŝoforo elektos mallarĝajn stratojn).

Atinginte la lokon, oni tuj konstatis ke ĝi multe pli agrablas ol tiu de la pasinta tago. Ĝi estis malgranda, kaj multe pli intimeca - ege taŭga por la prezentadoj kiuj okazos en tiu vespero. Fakte la muzik-prezentadoj estis altkvalitaj. Unue estis ludado de fluto far de paro el Braziljo, kiu ĝuigis la ĉeestantaron. Sekve, alia surprizo, sed tre bona, venis el Curitiba/PR: Daniel Haddad debutis antaŭ la nacia esperantistaro, ludante gitaron kaj kantante konatajn muzikaĵojn brazilajn kaj eĉ proprajn verkojn. Ĉiuj senscepte ŝatis lian agrablan voĉon.
Amarilio, kiel oficiala ceremoniestro, disdonis ĉemizojn al la eksterlandanoj, kaj invitis ĉiujn por la venonta prezentado - Markone Froes, de bando Merlin.
Li lanĉis la 3an diskon de la fama kolekto "Piratada Muziko', kaj kantis muzikaĵojn de Merlin kaj kelkajn de la 'kolekto', memakompananante per sia propra gitaro.

Ekpluvetis kiam nia arta vespero alvenis al la fino, kaj prezentigis foroa muzik-ensemblo. Nia grupo restis ankoraŭ iom pli, ĉar kelkaj dancemuloj provitis la etoson nordorientan, dum ĉe la tablo iuj drinkis iun afrodizian fiŝbuljono ("caldim de sururu!").



Denove la buso de fortalezanoj veturigis nin al la hotelo post longa atendo ene de la buso, kie ni ebriaj je laco kaj dormemo (kelkaj je fiŝbuljono), multege ridis - pri kio ĝuste, mi ne memoras, sed ja ni ridis. Jam en la hotelo, oni malkovris fremdan ŝtrumpon naĝanta en la necesujo de nia dormoĉambro - Ni eĉ supozis ke eble ĝi venis el supra etaĝo.

**Merkredo, la 21an de Julio**
**- Demokratio duras se vi molas**

"Matene okazis la ĝenerala asembleo de BEJO, en kiu elektiĝis la nova estraro, ĝi glate iris – la spertomanko de la plejmulto rilate al oficialaĵoj ne malhelpis la iradon de la asembleo. La plejmulto de la temoj estis klarigitaj en la pasitajn kunvenoj. (Pliajn informojn pri ĝi, vi trovos en la protokolo, baldaŭ diskonigota ie).

Tuj poste mi hastis por pretigi la ĉambron por mia prelego pri vegetarismo. Ĝi estis profita, mi montris plurajn aspektojn de vegetarismo, kaj la kialojn por fariĝi vegetarano. Se neniu viandmanĝanto pro ĝi vegetaraniĝis, almenaŭ neniu vegetarano manĝis viandon post ĝi. Ankaŭ mi provis disvastigi la mondan vegetaranan kongreson en Florianópolis ĉijare, ĉar Esperanto havos spacon tie por disvastiĝo inter la oficialaj lingvoj: la portugala, la angla kaj la hispana.

Post la tagmanĝo mi uzis la komputilon en librovendejo antaŭ la kongresejo, por kontroli mian elektronikan poŝton. Tie estis nur du virinoj uzantaj la komputilojn, kaj ankaŭ estis eta bebo, en bebĉareto. Mi ne sciis al kiu el tiuj du apartenis la bebo. Ili ŝajnis esti amikoj, ĉar unu parolis al la alia. Dum mi uzis la komputilon, unu foriris kaj la bebon zorgis la alia, sed iom poste tiu ankaŭ foriris kaj diris al mi: "Nun vi zorgu la bebon". "K..Kio??!!" respondis mi. "Ĉu la bebo ne estas via?!" "Ne, ĝi apartenas al tiu alia virino, kiu foriris" "Eble ŝi revenos tuj, ne plorigu lin, ĝis" diris la ino, jam forirante. "Ne plorigu lin???" Kion ŝi celis per tio? Mi ne nur ne plorigis lin, sed ankaŭ ekesperantigis lin ! Dum mi uzis la komputilon mi kantadis kelkajn E-muzikaĵojn kaj li eĉ ridis (aŭ havis muskolajn spasmojn).

Kongreseje, en la ĉefa salono jam ruladis la asembleo de BEL. La prezidanto prezentis la raporton de la estrar-periodo, la komisiono por la elekto de la nova estraro estis formita kaj montriĝis kiel esperantistoj kverelas pro stultaĵoj kiam estiĝis konfuzo pro tio, kiel skribi la nomojn de la balotatoj. Iu defendis la ideon skribi la tutan nomon, anstataŭ nur la unua nomo. Flavio kaj Petro ja estas tre similaj nomoj, ĉu ne? Kiu ajn povas konfuziĝi. Menciindas ke la fakto ke estis du grupoj konkurantaj al la estraro de BEL, tre multe igis interesa la aferon. Certe multe pli da esperantistoj turnis sian atenton al la asembleo, kio ne estas kutimo por multaj esperantistoj. Tial mi sugestas ke por la venonta estrar-elekto, se ne estos pli ol unu grupo, ke oni kreu eĉ politikistajn partiojn. Ekzmeple: PFE (Partio de Finvenkontaj Esperantistoj), PAL (Partio de la Anĝela Lingvo) PKT (Partio Kontraŭ Taglibroj) ktp. Longa vico estiĝis por la voĉdonado, kaj ankaŭ ioma konfuzo. Kaj la konfuzo ene de la salono eksteriĝis ĉar dume, la loko de la ĉi-vespera arta vespero ŝanĝiĝis tri fojojn. Je la kalkulado de la balotiloj, la salono preskaŭ malplenis, eble ĉar la plejmulto jam certis pri la venkonto, kiu estis Petro Kavaliro.

Forirante al la buso, kiu kondukos nin al la hotelo, akompanis min Eni kaj Schiavinatti, tamen verdire, estis mi kiu akompanis tiun lastan, ĉar mi ne sciis kie la buso troviĝas. Ni iris tien kaj reen kaj fine kiam ni ekvidis la aŭtobuson, ĝi ekiris kaj Schiavinatti (Skiavinaĉo por amikoj) devis kuri malantaŭ ĝi kriante malhelpe de siaj ornampendaĵoj (foto kaj video-kameraoj). Tre amuze.

La loko de la arta vespero fine restis la sama, tamen ne entute la sama, ĉar en la pasinta tago kelkaj esperantistoj kiuj restis ĝis la prezentado de la foroa grupo, forirante ne pagis la 'couvert' de la grupo. Pro tio, ĉiuj estis devigataj pagi R$5,00 ĉe la enirejo, kaj rericevos ĝin en la foriro, se oni foriros antaŭ la prezentado de la drinkeja grupo. Eĉ la pordo, pasintvespere apertaj, estis fermitaj ĉi-vespere. Kia bela ekzemplo, esperantistoj en kaĝo!




# LA NOVA ESTRARO DE BEJO

gotardi, ariádne, rogener, rodrigo, advalk, isis



**Ĵaŭdo, la 22an de Julio**
**- Esperanto (Ladislaŭ) kiel revelacio**
"Preskaŭ ĉiuj foriris pli frue ĉar en la posta mateno multaj partoprenos ekskursojn, kaj ni iris al Porto de Galinhas/PE. La promeno estis tre agrabla, kelkaj veturis per 'buggie' dum aliaj vizitis la naturajn naĝbasenojn, kie ni trovis du belajn germaninojn al kiuj Sebastian funkciis kiel... interpretisto ;-)

Malgraŭ nia sorto kun la ŝoforo (tiu ja fiŝoforaĉo), kiu ne plenumis siajn kontraktitajn devojn, eblis ĝui la revenon parolante pri la venonta kongreso (t.e. rakontante gaŭĉajn anekdotojn). Ladislaŭ ankaŭ provis rakonti ŝercojn sed li rakontis "sorĉaĵojn". Ni multe ridegis - ne pro la anekdoto, kompreneble!

## "NI TROVIS DU BELAJN GERMANINOJN AL KIUJ SEBASTIAN FUNKCIIS KIEL... INTERPRETISTO"

Bedaŭrinde li ne sciis varbi ilin al Esperanto.

Ĉe la tabloj, gapigis nin la improvizkantistoj, kiu tre lerte kapablas munti rimojn pri kio ajn. Kiam mi stariĝis por filmi ilin, eĉ mi eniris la rimojn: "E agora o cabeludo começou a me filmar, ô corno! Saia daí pra esse filme não queimar!" (la kokrito ne estis mi!).

Ni alvenis al Maceió malfrue por la solena fermo, sed feliĉe ankaŭ ĝi malfruis. La teatro estis plena, kaj Amarilio denove gvidis la feston. Prezentiĝis koruso de la urbo, folklora teatro-grupo, Neide Barros, sed plej furoris la pupteatro el Fortalezo/CE, kiu rakontis la historion de virino kiu forlasis nordorienton antaŭlonge kaj nun revenas kaj enamiĝas al tre maskla homo."

**BILDOJ|** AMARILIO FORGESAS SIAN TEKSTON MEZE DE TEATRA PREZENTADO (!)
**RAPORTIS|** RAFAEL LINS (SALVADOR/BA)





**Vendredo, la 23an de Julio**
**– Mi ne volas ellitiĝi**
"Vendredo estis libera tago. Ho! Kiom bone estas dormi iom pli kaj vekiĝi malfrue. Bedaŭrinde kiam tio okazas en hotelo, oni maltrafas la matenmanĝon...


Mi decidis iri piede al superbazaro aĉeti manĝprovizon, ĉar tapiokon mi ne plu eltenus. Reveninte al la hotelo mi ricevis telefonalvokon de Eni (São José dos Campos/SP), kiu invitis min kaj De Méo-n viziti budhisman templon.

Bonega oportuno! Mi ne estas budhisto, tamen mi iom konas kaj ŝatas la filozofion budhisman. Eni klarigis al ni, ke la monaĥino, kiu zorgas la templon, kiun ni vizitos, estas la unusola virino kiu atingis la plej altan rangon en budhismo. Krome, ŝi ne parolas la portugalan!

Bone, almenaŭ ni profitis la okazon por propagandi Esperanton al ŝi. Ŝi invitis nin al teumado, ni akceptis kaj mi profitis kaj petis permeson por filmi iomete en la ĉambro de la templo, kie troviĝas multaj belegaj artaĵoj budhismaj.

Nu, mi kun la manio de "Spielberg", filmadis marŝante reen kiam mi sentis ke mia piedo trafis ion, kaj mi aŭdis la sonon de objekto trafanta la plankon. Mi rigardis kaj vidis ke mi faligis cindrujon sur la tapiŝon, kiu kovris la tutan ĉambron. La afero ne estis pli hontiga por mi, ĉar danke al Budho ĝi ne rompiĝis, sed ĝi estis plena je cindroj, kiuj nun kuŝis sur la ruĝa tapiŝo.
Malgraŭ ke, kiel mi sciis poste, ili aŭdis la bruon en la kuirejon, bedaŭrinde, ĝi ne estis sufiĉa por veki ties atenton por venigi ilin al salono kontroli tion, kio okazis. Ja bedaŭrinde, ĉar tiel mi devis iri tien kaj ekspliki al la monaĥino (memoru: la plej altranga) ke mi faligis la cindrujon...

Dum mi fine filmis (ĉar mi sciis ke poste mi ne povos filmi ion ajn tie) mi klopodis trovi la vortojn en la angla por diri: "Monaĥino, mi faris fuŝaĵon, mi faligis la (damnan) cindrujon en la ĵus purigita tapiŝo. Kompatu min, ĉu la budhistoj ne estas kompatemaj?"




**BILDO |** HUMURA AFIŜO POR LA 48-A INTERNACIA SEMINARIO (IS),
NOVJARA RENKONTIĜO OKAZONTA EN WETZLAR, GERMANIO





Rodrigo eĉ supozis ke la cindroj estis de iu forpasinta budho, aŭ de la fondinto de la templo. Feliĉe estis nur incenso-cindroj. Ŝi konsilis al mi praktiki meditadon, sed tio estis antaŭ ol frapi iun ceramikan bufon per la piedo kiam ni vestis niajn ŝuojn por foriri. Poste tio, ŝi konsilis al mi resti tie, ke ŝi per lignobastono korektos min!!

Ni revenis post la sunsubiro en la hotelon, kaj multaj kune iris vespermanĝi en iu restoracio nomata “Alecrim”.
Reveninte al la hotelo, ni ankoraŭ babilis ĉirkau la naĝbaseno kaj estis tie mi forgesis la fotomaŝinon ciferecan de mia frato. Mi talentojn kantante per la mikrofono de la autobuso.Tiaj mikrofonoj neniam funkcias, kial do, tiu damna mikrofono plene funkciis?

Aŭskultante ilin, mi ekkomprenis kial tiom multe da esperantistoj kabeas. Mia malbonŝanca nubo atingis kelkajn en la flughaveno (forgesiĝis valizoj, forĵetiĝis aviadilbiletoj) sed ĝi ne estis sufiĉa por faligi la aviadilon. Zaĉjo certe zorgis tiun flugon!

Mi ne havas kutimon kontroli la zodiakon, tamen analizante la okazaĵojn en ĉi tiu semajnfino, mi pripensas la eblecon akiri tiun kutimon, por antaŭscii en kiuj tagoj mi

## “ZAĈJO CERTE ZORGIS TIUN FLUGON”

metis ĝin sub la ĉefan tablon (kie estis alia kvazaŭa eta tablo) por ne malhelpi dum la babilado. Kaj simple forgesis ĝin tie. Ĉar en la posta tago, mi ne emis foti, mi ne rimarkis ĝian mankon. Ho! Pli bedaŭrinde ol devi repagi ĝin al mia frato, estas perdi ĉiujn fotojn faritajn, precipe tiujn, kiuj montris Advalk-n balete dancante.”

**Sabato, la 24an de Julio - "Mejlojn for"**
“Sabate matene, mi decidis profiti la plaĝon. Iris mi, Ariádene (Curitiba/PR) kaj Ladislaŭ. Ni profitis la plaĝon, la venton kaj la pluvon. La suno nur ekaperis kiam mi jam revenintis al la hotelo kaj ekbanis min. Por tagmanĝi kelkaj amasiĝis kaj gustumis nordorientan dolĉaĵon el fruktkernon "açaí" en budo proksime da la hotelo. De ĉiuj aliaj, la frandaĵo bonege aspektis, krom la mia, kiuj similis al glacia supo. Mi iris preni monon en bankaŭtomato kaj konstatis ke mankas malmulte por ke anstataŭ de la maŝino, mi devis preni monon de iu.


En la buso por iri al flughaveno, kelkaj esperantistoj decidis montri siajn kaŝitajn ne devas ellitiĝi.
**Sed verdire tiu sorto ne kompareblas al la ege feliĉiga semajno, kiun mi havis en Maceió.”**

*****************************

–> Mi deziras danki al Aristhopio kaj al la LKK-anoj kiuj sin dediĉis por la realigo de la kongreso. Mi speciale dankas al: Isis kaj James Piton, Sonia Sánchez kaj Neusa Priscotin Mendes (MiMa).

**VORTARETO**
**Buljono** – Likvaĵo simila al supo.
**Svingi** – Rapide, ripete mov(et)i ion tien kaj reen en la aero
**Floso** – Objekto por transporti homojn sur akvo
**Kovraĵo** – Slanga esprimo por registraĵo au koncerta prezento de muzikpeco, kiu originale estis farita de alia artisto
**Bendakompano** - Kantado aŭ ludado kun akompano de sonbendo (aŭ simile) anstataŭ muzikistoj.

**RAPORTIS |** ROGENER PAVINSKI.
“DIÁRIO DO KONGRESO” ESTAS SERIO SENDEPENDA PUBLIKIGITA DE BEJO EKDE 2001




## ROGER GOTARDI kaj MANUELA >

### MACEIÓ, BEJK '04

La plej romantika paro en Esperantujo devenas el Curitiba: "tre mallarĝaj stratoj".



## SONIA SÁNCHEZ >

### MACEIÓ, BEJK '04


La artistino anoncas je la malfermo de la kongreso: "Indiĝenoj volas paroli Esperanton".



## LADISLAŬ >

### MACEIÓ, BEJK '04

La revelacio de la 39ª BKE estas ankaŭ intervjuisto.



# INTERVJUO >>>
## JOE BAZILIO COSTA

*"Elektu laboron, kiun vi amas kaj vi ne bezonos labori eĉ unu solan tagon dum via tuta vivo"– Konfuceo (Ĉina filozofo, 551-479 a.K.)*

**Profesio** estas okupo por vivteni sin. **Hobio** estas la okupo preferata krom la profesio.

"Saluton, mi estas Joe Bazilio, 46-jaraĝa. Mia kora profesio estas tiu de muzikisto. Mi ludas kontrabason kaj en senfaraj momentoj iom la gitaron. Mi ludis dum la lastaj 25 jaroj kun multaj artistoj de Brazilo, kiel Vanderley Cardoso, Jerry Adriani, Zé Ketty, Rosa Maria, Sula Miranda kaj aliaj.

## "SURGRIMPI HELPAS PRENI DECIDOJN, ESTI PACIENCA, TROVI ALIAJN... VIDPUNKTOJN"

Profesio ne ĉiam sinonimas al ĉiam neplaĉaj devoj kaj al strikte teknike senanimaj faroj. Hobio ne ĉiam resumiĝas al spektado de televidilo kaj aŭskulti muzikaĵojn.


Bone montras tion la ekzemploj de Joe, el Formiga-MG. Laŭ peto de 'Momenton!' li iom rakontis pri siaj okupoj. Profesie kaj hobie!

Mi konis preskaŭ la tutan Brazilon kaj mi havas amason da geamikoj tra nia "kontinento".

Mi nuntempe havas la profesion de desegnisto. Mi desegnas per komputilo kaj mi havas malgrandan entreprenon, IMAGU Propaganda. Ni produktas grafikaĵojn diversajn: glumarkojn, ĉemizojn, standardojn, donacetojn, kartojn, grafikaranĝojn por revuoj, libroj, faldfolioj ktp.

**INTERVJUIS |** ROGENER PAVINSKI (RIBEIRAO PRETO/SP)
**DEKSTRE |** JOE BAZILIO COSTA (AMIKO@UAI.COM.BR)





Mi ankaŭ instruas Esperanton en Formiga Esperanto-Asocio kaj en la baza lernejo Bernardes de Faria, en la urbo Formiga. Mi havas multajn hobiojn sed mia preferata estas la montgrimpado... tio estas bona por la menso kaj la korpo. Dum oni surgrimpas ne plu ekzistas problemoj, la ĉiutagaj malhelpoj malaperas. Tiu ekzercado helpas preni decidojn kaj ankaŭ esti pacienca, solvi problemojn, trovi aliajn vidpunktojn, ĉar ĉiu monto estas nova enigmo iom post iom solvenda.

Mi havas teamon pri radikalaj sportoj (VERTIKALA) kaj mi estas ano en alia fakgrupo, pri kavernoj (EPA). De ses jaroj mi estas naturprotektanto kaj nia grupo malkovras, prizorgas kaj protektas kavernojn kaj la naturmedion. En tiu ĉi monato ni okazigos aventurkonkuradon ("corrida de aventura") en Pains-MG kaj ni invitas la gejunularon esperantistan partopreni.

Al mi ankaŭ plaĉas fotografio (ni gajnis du premiojn ĉijare en la konkurso de la gazeto 'La Ondo de Esperanto' el Rusio) kaj nuntempe mi esploras video-filmadon. Mi jam pretigis dekminutan filmeton pri eta rakonto ĉina (mi intencis prezenti ĝin en la ĉijara BKE, sed bedaŭrinde mi forgesis la pakaĵon en la aŭto...).

Nia venonta tasko estas filmi la rakonton "Gerda Malaperis". Estos surprizo... atendu vi ĉiuj!



**ĈIPAĜE | ESPERANTO DESPERADO, 2004.**
**LA ENSEMBLO PREZENTAS SIAN NOVAN ALBUMON "HOTEL DESPERADO"**





# < ESPERANTO DESPERADO
## ENIRU KAJ ĜUU!


Kutime ni renkontas Esperanto-ensemblojn kun tre malmute da instrumentoj kaj simplaj aranĝoj, kvankam ne pro tio nepre malbonas la rezulto. La nova KD "Hotel Desperado - dekdu ĉambroj por amo kaj festo", eldonita de Vinilkosmo, tiusence vere surprizis min. Ĉifoje eblas aŭskulti altnivelan produktaĵon, kun diversaj muzikinstrumentoj: fluto, gitaro, drumo, perkutilo, klasika gitaro, trumpeto, saksofono, akordiono kaj piano.

Kun diversaj stiloj kaj ritmoj el diversaj landoj, eblas imagi ke oni ĵus eniris hotelon kaj tuj komencas aŭdi muzikojn de esperantistoj de diversaj kulturoj. Kial ne revi pri tio, ke oni vojaĝas por partopreni Universalan Kongreson?

Por tiu, kiu ŝatas la brazilan grupon "Skank" la KD oferas muzikon kun tre simila stilo, tre danciga. La uzado de saksofono memorigas min pri alia brazila ensemblo, "Paralamas do Sucesso", ekzemple en la unua kanzono, "Ska ritmo". Kompreneble mi ŝatis ĝin... tamen estas tre malfacile forigi ĝin de la kapo post tio, ke oni aŭdas ĝin! Ĉu oni intence faras "cerbolavadon" per tiu kanzono?

Tre plaĉis al mi "Omaĝe al Marie Schroder", kantita de Martin Wiese (de la ensemblo Persone), kaj "Ĉi nokte", pli romantika. Ankaŭ JoMo partoprenis, en "Ne permesas". Helle Eble Cleary havas belegan voĉon. La teksto kaj muziko "Dancu (La balado pri li kaj ŝi)" estas verkitaj de Helle. "Sunradio" estas alia bela komponaĵo, kiu tre plaĉas, same kiel la tuta rezulto de la KD.

Rekomendinda!




**RECENZIS |** ISIS OKABE PITON (CAMPINAS/SP)